


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO 'DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO: E. VAN VEENENDAAL-BOUWES, LIMMEN NH. NEDERLANDO • ADMINISTRACIO: T.J.O. CENTRO WESTGRAFDIJK NH. NEDERLANDO. ĜIRONO 382363 • JARABONO 1.50 NED. GULDENO ĤU EGALVALORO

Por progresintoj.

ĈINA RAKONTO.

La patrino de la Universo havis du filojn: la dio de la saĝo kaj la dio de la milito. Ambaŭ deziris sidi sur ŝiaj genuoj.

„Mi ne povas sidigi vin ambaŭ”, diris la patrino. „Faru vojaĝon ĉirkaŭ la Universo; tiu, kiu unue revenos, rajtos sidi sur miaj genuoj.”

La dio de la milito saltis sur sian kurĉevalon kaj forflugis kiel sago el paf-arko. La dio de la saĝo, kiu sidis ĉe la piedoj de sia patrino, aŭdis, kiél lia frato forrajdas. Li leviĝis, riverencis antaŭ sia patrino, marŝis trifoje ĉirkaŭ ŝi kaj sidiĝis sur ŝiaj genuoj.

Kiam la dio de la milito post multaj jaroj senspire revenis, li vidis sian fraton sidanta sur la genuoj de sia patrino; li ekkoleris: „Kial vi lasis lin sidi sur viaj genuoj?” li ekkriis, „li ja tute ne foriris!”

Kaj la patrino respondis: „Kio valoras, mia filo, ne estas: vojaĝi ĉirkaŭ la Universo, sed vojaĝi ĉirkaŭ la centro de la Universo”.

El: Le Jardin des Rochers N. Kazantzaki.

TRAD T. JOAN.

La kunveno en Blankenberge okazos 2, 3, 4, 5 Aŭgusto.

**MIA TAGLIBRO PRI LA DUA INTERNACIA JUNULAR-
KUNVENO EN BELGUJO (Tervuren, 7-14 aŭg. '39).**

(La post-skribo)

„Spite niajn ĝojojn, niajn ridojn, niajn aventurojn, niajn dezirojn kaj esperojn: Spite ĉion, la kongreso finiĝis.

Nun ni staras meze de la materiala vivo, meze de la ĥaosa mondo.

Tagoj jam forpasis, eĉ monatoj, sed des pli belega fariĝas al mi tiu restado en Tervuren.

Kiam mi ĉirkaŭrigardas kaj ekvidas la ĉagrenon, la minacon super ni, tiam mi revokas en mi Tervuren.”

Ho Tervuren!

Tiam mi pli bone komprenas, kia estis la kunveno.

Tervuren! Ne plu revenos tiaj belegaj tagoj. Neniam plu.

Pasintaj, sed ne forgesitaj!

Ĉiela tempo! Paradiza vivo!

En Tervuren kreskis nia amikeco; por ni ĝi estas nuntempe la plej bona apogilo! Ŝajne mi sola staras. Sed en malĝojaj tagoj mi sentas vin. ĉiujn, karajn amikojn, ĉirkaŭ mi!

Vi vivadas en mia koro, vi ĝojigas min: vi estas la plej granda parto el mia vivo!

Dum la adiaŭo ni kriis unu al la alia: „Ĝis revido en Boulogne s/Mer!” Jam tiam ni faris belegajn planojn. Esperante ni rigardis en la estonton. Nekonata ĝi ĉiam ŝajnas bela.

Al la Estonto ni donacis niajn dezirojn, niajn esperojn, niajn ĝojojn! Sed, ĝi trompis nin! Nia deziro je renkonto ne realiĝos. La grava situacio internacia malpermesas. Nia bela perspektivo malaperas.

Mi malĝojas..... ĉar estas en tiaj malbonaj tempoj ke mi sopiras al renkonto. Ho, renkonto ĉiam sonas bele, amike.

Mi kelkfoje ribelas kontraŭ la sorto de l'homa vivo, sed vane, mi poste tiom pli forte devas kompreni kaj klini la kapon.

Malami la vivon mi ne povas, mi ne rajtas; ĉar tro bela, tro kara ĝi estas. Sed homoj ni estas, kaj ni ĉiam deziras!

Homajn dezirojn: ni certe rajtas fari tiujn.

Sed, jes, super ni ŝvebas io, kaj tio estas la plej granda demandsigno: la sorto. Vi certe jam rimarkis, miaj karaj, ke mi en ĉio ekvidas la sorton. Eble ne estas logike, eble jes sed devas esti io aŭ iu, kiu gvidas tiamaniere niajn vivovojojn. Ĉu vi

ankoraŭ ne demandis vin, kial okazas tio aŭ tio, kial vi ne povas fari ion, kial vi renkontas tiun personon?

Ĉiam kial! Ege strange! Nekompreneble!!

**

Monatoj jam pasis, mi diris. Kiom longa tempo!

Ĉiutage mi rememoras, mi pripensas, kaj kiam mi rigardas la fotojn, mi ne scias, kia mi devas esti: Feliĉa aŭ malfeliĉa. Mi perdis ion kaj mi rajtas malĝoji, sed mi trovis bonegajn geamikojn, mi travivis neforgeseblajn tagojn, mi kunportis rememorojn kaj mi devas ĝoji.

Kiom kara estas la vivo, kiu donacis al mi tiajn rememorojn.

Fakte mi ne rajtas malesperi.

Ho amikoj, kiom karaj vi estas al mi, ĉiutage vi vivadas en mi. Mi ne povas vivi sen Tini, Jekke, Denie, Job, Rein, Floór, Carlos, Jef. For estus la apogo en tiu ĉi vivo, kiun mi ne komprenas. Vi ĉiuj apartenas al mi. Kiom kara posedaĵo! Mi ĝojas, mi feliĉas, sed mi ankaŭ timas!

Meze de ĝojo mi ĉiam timas: ĉar ĉu mi longtempe posedos ĝin, ĉu mi longtempe posedos vin, miajn karulojn?

Nun, kiam distancoj, limoj, ankoraŭ ne sufiĉas disigi nin, ŝvebas gravaj minacoj super ni. Ili estas la plej gravaj: pripensu ke pro ili ĉiama disiĝo povos ekesti inter ni!

Sed ni esperu.

Esperi, ni ĉiam devas. La vivo nur estas espero!!

La vivo postulas nian laboron, niajn zorgojn, nian penadon, kaj iam ĝi rekompencos nin. Iam ni ĝuos la plej agrablajn horetojn: revido certe venos, miaj karaj geamikoj.

Revido, renkonto, kiel kara ĝi sonas al mi.

Mi ĉesas, karaj amikoj, mi adiaŭas, sed angle mi diras.....

„Ĝis revido..... ĝis revido!”

Roger Cosijns.

PRINTEMPO EN HOLANDO.

(El la klubgazeto de „La Kampflorej”, W. Graffdyk, Ned).

Paperoj flaviĝas, urboj perdas sian brilon. Sed la libro de la naturo ĉiujare ĝuas novan eldonon. ANDERSEN.

Por vidi tion, tamen necesas ke ni lernu legi en tiu libro, kaj tio ne estas facila. Aŭ, fakte tamen estas facile, ni nur bone observu. Kaj precipe printempe ĝi povas vidi multon. Ĉiam ree oni vidas aliajn birdojn, kiuj revenis el la sudo, aŭ plantojn, kiuj ree ekfloras. Se vi larĝe malfermas okulojn kaj orelojn vi spertos multe!

Ĉu vi jam aŭdis la alaŭdon? La 12an de februaro mi unuafoje aŭdis unu, sed tiu ja estis tre frua. Kelkajn semajnojn poste mi vidis du flugi supren. Io rimarkinda! Kuŝis dika neĝtavolo, sed la suno brilis, kaj la ĉielo estis egalblua. Tamen la birdoj jam sentis ke la printempo alproksimiĝas! Ankaŭ la vaneloj revenis. Rigardu, ĉu vi rekonos ilin. Multajn birdojn oni povas rekoni laŭ la voĉo. Kelkaj krias sian propran nomon.

Jam tre frue en la printempo la kapoj de la kapmevoj bruniĝas. Tio estas ilia somera vesto. Dumvintre ili havas nur flavan makulon malantaŭ siaj okuloj, sed nun la tuta kapo estas ĉokolade bruna. De malproksime ĝi ŝajnas nigra, sed tiel ne estas.

Ĝis nun ni nur pritraktis la birdojn. Ankaŭ ĉe la plantoj estas multo vidinda. La amentoj de alno kaj saliko certe formas la komencon. Vi tiel bele povas elburĝonigi ilin en la ĉambro, same kiel la kaŝtanbranĉojn. Tiuj en la ĉambro ankaŭ tute disfaldas la foliojn. En nia ĝardeno ni jam en Februaro vidas, kiel la galantoj montras siajn kapetojn. En marto ekfloras jam diversaj kampfloroj. Poste ĉiaj florspecoj sin sekvas: lekantetoj, leontodoj, papavoj, ktp.

Kanto de la N.J.N. (Ned. Ligo Gejunula por Naturstudado) diras: „La naturo fortigas nin, por la vivo kiu atendas nin.”

Eble ne ĉiuj same forte sentas tion, sed estas fakto, ke la naturo povas doni al ni multon, se ni nur volas vidi ĝin.

GUDA MEYZEN (18-jara).

KIO RESTOS.

Ruin' fariĝos eĉ kastel' granita
Mordata de l' potenca tempodent'.
Rakontos la fabel' pri tron' rompita,
Apenaŭ interesa post jarcent'.
Trezoroj grandaj, zorge kolektitaj
Perdiĝos tute en la tempoflu',
Sed malgrandaĵoj eĉ, de ni faritaj
Por ideal-afero, daŭros plu!

El „La SAT-ido (Portugalujo)

H. WEINHENGST.


Junularo, nia gazeto ne estas nur *por* vi; ĝi estu ankaŭ *de* vi. Do: kunlaboru por fari ĝin plej interesa; verku artikolojn pri kiu ajn temo. Kaj se vi nepre ne povas verki: konigu viajn dezirojn pri la enhavo de „La Juna Vivo”.

Manuskriptoj por „la Juna Vivo” estu en la redaktejo antaŭ la unua de ĉiu monato. Post tiu dato ricevitaj sciigoj aperos en la sekva monato!


LULIGU MIA ŜIPETO.

(Kanteto de la franca regiono: Bretagne; Skota deveno)

Tradukis: Marrelle Turin-Montagnon.



De la ta-gi-ĝo ĝis — la nokt' Fiskaptas mi sur mar',
Sed jen ŝtormet' plu-ve-gas al mi kaj furi-ō-zas mar',
Nun bela estas la ve—ter' Tra naĝu vel-ŝi-pet' !
Ĉe l'horizonto subiras sun' kun lasta bril'al ni,



Se la lum-tu-ro brilas tra nokt' Revenas mi el mar'.
Tra-plu-vi-gi-taj for-inas ni Rajdante, sur la mar'.
Ra-pi-du al la vi-de-bla ter' Tra blanka ŝaumsipet' !
Sur mia ŝip' fiŝ — ple — na nun Al haven' flugas mi !



Lu-li-ĝu ŝi-po mia sur mar' Ŝveligu velon vent'



kiel bir-de-to sur la ondar' glitu ĝi en si-lent' !

INTERNACIAJ KUNVENOJ.

La konferenco en Blankenberge okazos 2, 3, 4 kaj 5 aŭg., do daŭros 4 tagojn.

Ni povos vojaĝi per komuna pasporto.

En Holando oni povas pagi per nederlanda mono, ankaŭ por la hejmvoyaĝo. Unuvetura bileto Amsterdamo-Blankenberge (preter Vlissingen) kostas proksimume 8 guldenojn.

NIA TUTMONDA FAMILIO.

..... La morgaŭo apartenas al la hodiaŭa junularo, kaj se ni sukcesas en niaj celadoj por tutmonda amikeco kaj interkompreno nun, nia unuigita mondo estos paca en la estonteco.

Sed vortoj estas tute senvaloraj, se ni ne agas. Tro multe da gejunuloj lernas Esperanton nur por korespondado kaj interŝanĝo de poŝtmarkoj aŭ bildkartoj. Esperanto ja estas bonega perilo por tio. Sed ni ne forgesu la veran celon de nia lingvo. Ni ĉiuj agu por la disvastigado de la lingvo. Ni lernu parkere kaj sincere la mesaĝon de la ĉina pastro Kao pri „La vera Esperantisto”, kiu aperis en „LJV” antaŭ nelonge. Ni lernu, kaj tiel agu!

DERRICK P. FAUX, Painswick (Angl).

..... Tie ĉi ni ĉiuj restas fidelaj, sed vi ne povas imagi kiom grandaj estas niaj malfacilaĵoj pri mono. Preskaŭ ni ĉiuj gajnas la saman salajron de antaŭ la milito, aŭ de antaŭ 10-15 jaroj. Kelkaj estas plialtigataj per 27-30 %, sed la vivbezonaĵoj, manĝaĵoj, vestaĵoj, ŝuoj, ktp, kostas 200, 250 kaj eĉ 300 % pli ol antaŭe. Sufiĉas se mi diras ke laboristo perlaboras 16 eskudojn por tago, tio estas 8 poŝtmarkoj por letero al la eksterlando!

..... Mi starigis muzikan grupon „Verda Stelo”. Tiu grupo estis bona propagandilo por nia movado. Nuntempe ĝi ne funkcias, ĉar ni vendis la ĝazbandon por helpi malsanan samideaninon. Malfeliĉe ŝi mortis (20-jara) kaj la mono nur estis por pagi la funebrajn elspezojn.

Ni faros kion ni povos, por ke Esperanto kaj muziko ĉiam pli unuiĝu en nia vilaĝo. Mi eĉ jam interesigis la muzikestron pri Esperanto. Mi prezentis al li la Internacian Kantaron de „La Juna Vivo”, kiun li trovis tre interesa.

RASQUINHO JUNIOR (Aljustrel, Portugalujo).

..... Ĉiutage mi iras al Bruselo kaj en la trajno mi kantas kun Raymond Philippon kaj Berthe Decléf, kiuj fariĝis TJO-anoj samtempe kiel mi. La kantadon ĉiu el ni ŝatas preskaŭ tiel kiel Esperanton. Tia propagando malmulte kostas kaj estas agrabla por ni kaj por la aliaj.

Philippe Cullus, (Belg).

..... Post la milito, kiu semis tiom da suferoj tra la mondo, kiu donis tiom da malfido kaj malkuraĝo al multaj gejunuloj, la

junularo bezonas novan entuziasmon, novan fidon al la Vivo, al la tutmonda frateco. Esperanto povas doni tion al ili. Sed por kredi en la Esperanto-forto, ili bezonas kontroli ĝin en internacia kunveno, dum kiu ili renkontos amikojn el la tutmonda junularo. Multaj korespondantoj — novaj esperantistoj, deziregas praktiki plej rapide nian belan lingvon, en internaciaj renkontiĝoj kaj demandas pri la venonta! S.ino Turin, Trépot (Franc).

KRUC-ENIGMO.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
I									
II									
III									
IV									
V									
VI									
VII									
VIII									
IX									

Horizontale: I. Helplingvo. II. Atente plenumas bezonaĵon; finaĵo. III. Grasa fluidaĵo (rad); konsonanto; teatraĵero (rad). IV. Demanda vorto (rad); meblo. V. Marbesto; vokalo. VI. Montra vorto; koto (rad). VII. Sur ĝi tuta oni parolas esperanton (rad); adjektivo pri kvanto. VIII. vokalo; 2 vokaloj; konsonanto; finaĵo; IX. Kiu vivas laŭ naturaj reguloj.

Vertikale: 1. Fiŝo; por pagi. 2. Nur li muzikas (kantas); vokalo. 3. Renverse: skrapi kampon (rad); malgranda kuvo el ligno (rad). 4. sufikso; donu lumon aŭ varmon. 5. Superas forton; konsonanto. 6. finaĵo; vokalo; tirante dispartigi. 7. konsonanto; utila insekto; konsonanto. 8. Perfingre ridigi (rad); same fari (rad). 9. korpa parto; pajla tapiŝo. G. TURIN (Trepot, Francujo).

Ni akceptos solvojn ĝis la 1-a de junio. Sendu al TJO-Centro en West-Graafdyk, Nederlando.

Al la kursgvidantoj.

En aprilo finiĝas la plej multaj kursoj, kaj vi certe demandas vin: „Kion mi faru kun la novaj esperantistoj”? Daŭrigi la instruadon dum la somero ofte estas malfacile, kaj se vi perdas la kontakton kun la lernintoj, ili grandparte perdiĝos.

Jen la bona momento por aligi ilin al TJO. Same kiel antaŭ la milito „La Juna Vivo” ree enhavos simplan parton por komencantoj. Multaj grupoj jam aligis la junajn membrojn. Ili pagas etan sumon semajne, kaj ricevas por tiu bagatelaĵo bonan internacian gazeton. Tiel la junaj homoj iom post iom, eble nekonscie, fariĝos parto de la Homaro, de la grandega, tutmonda Familio!

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekt. Floor Meydam, Owenstr. 59, Leerdam, Ned.)

La estraro kunvenis la 10an de marto en Amsterdam.

Ĝi decidis partopreni en la *kolektado de petskriboj* al la Unuigitaj Nacioj (vidu LJV marto '46). TJO nur se necese memstare agados je tio; kie eble ĝi laboros en la kadro de la agado de la naciaj Esperanto-Organizoj. Por havi tamen superrigardon pri la aktiveco de la TJO-anoj je tio estas dezirinde ke en ĉiu lando la ĉefperanto (en Ned. la TJO-Centro) ricevu la plenigitajn formulojn kaj poste sendu ilin al la centra adreso kiu ekspedos ilin al IEL.

Pri la *Internacia Junularkunveno* en Blankenberge, Belgujo, diversaj estraranoj aŭdigis pesimisman sonon, pro la nunaj ekonomiaj, politikaj, trafikaj cirkonstancoj internaciaj.

Pro la fakto, ke probable ĉeestos en tiu kunveno ĉefe belgaj membroj kaj proporcie nur malmultaj membroj el la aliaj landoj, la estraro opiniis, ke la kunveno ne povos havi decidorajtan laborkunsidon. Tial la kunveno havos la karakteron de *konferenco*. Poste ni per enketo voĉdonos pri la farotaj decidoj. Tiucele aperos en „LJV” raportoj pri la organizaj preparoloj de la nacia kaj internaciaj konferencoj.

La estraro decidis fondi *libroservon*. Ĝin prizorgos la TJO-Centro en West-Graafdyk (f.ino N. Kool), TJO transprenos la librostokon de la privata eldonejo de ges.roj v. Veenendaal, kiu ĉesos tiun entreprenon favore al TJO.

Laŭ raporto de la organizantoj de la „*Interŝanĝo de ned. kaj danaj infanoj*” la antaŭpreparoj por tio bone progresas.

El la raporto pri la filmservo montriĝis, ke la intereso por la TJO-filmoj estas eĉ pli granda ol iam ajn. Tuj kiam eble, filmkopioj estos farataj por la diversaj landoj.

Svedujo (Ĉefperanto Karl Erik Karlsson, Upplandsgatan 691, Stockholm): Aperis bonegaj artikoloj en „*Esperanto-Tidningen*” kaj en „*Arbetar Esperantisten*”. Multo en Svedujo ankoraŭ devas esti farata por Esperanto kaj TJO. La svedaj Esperantistoj kaj TJO-anoj estas admonataj streĉi la fortojn por nia tre grava afero. Se vi ankoraŭ ne estas membro, turnu vin al la loka peranto, aŭ se en via loko ne estas peranto, turnu vin rekte al la supra adreso.

Laboru aktive, kaj fine ni venkos! Jen la signalvorto: Esperanto al la junularo.
K. E. K.

LA TJO-FILMOJ.

Precipe en Rotterdam oni bonege propagandis per la filmoj. Oni i.a. montris ilin en A.N.J.V.-Sekcio, en kunveno de 3 F.L.E.-sekcioj kaj LEEN-grupo, en la klubejo „De Arend”; por skolta grupo kaj en kunveno en ULO-lernejo. La sukceso estis bonega. Generale la Esperantistoj ne sciis, ke TJO jam tiom enpenetris. Nur post kiam ili vidis la filmojn, ili komprenis nian movadon. Ofte ja ankoraŭ regas la miskompreno, ke TJO estus nur „infana movado”. Neniu pli bone povas refuti tiun antaŭjuĝon ol la filmoj mem!

KONSTRUADO.

Leganto pri konstruado ni tuj pensas pri domoj el ŝtono aŭ ligno. Tamen estas aliaj loĝejoj. Ili ne estas malpli gravaj. Ni celas la spiritan ejon, kiu entenas la pensojn de la membroj de nia organizo. Nevideblaj estas ties muroj. Tamen, estante, en niaj kunvenoj, neniu dubas pri ĝia ekzistado. Ofte la idealo de Zamenhof, la tutmonda, interhoma amikeco estas sentebla. Ĝi beligas nian vivon kaj instigas al noblaj faroj. Por propagandi tiujn spiritajn valorojn ni tamen bezonas materiajn ilojn, antaŭ ĉio bonan gazeton, kiu respiegulas nian organizan vivon. La konstruado de nia spirita ejo ne permesas prokraston. Niaj amikoj eksterlandaj ne ankoraŭ povas transsendi al ni monon. Se ili deziras partopreni en la konstruado ili sendu siajn subtensumojn al la landaj perantoj, kiuj siatempe aranĝos la kontojn kun la T.J.O.-kasisto. La holandaj membroj aŭ grupoj de T.J.O. sendu sian subtenon al La T.J.O.-centro, West-Graafdyk, Postgiro No. 382363.

Membroj, kiuj deziras **pruntedoni** al T.J.O., sendu minimume f 2,50 al la T.J.O.-centro. Ili ricevos ateston pri la sumo prunedonita.

ONKLO PIT.

Raporto pri la donacoj aperos en la sekvonta numero.

Ni propagandu!

Por la propagando la ned. sekcio de TJO jam delonge serĉis film-aparaton. Nun oni proponis por nia celo taŭgan ekzempleron, sed ĝi kostos sufiĉe da mono, ĉar ankaŭ ĉeestas foto-aparato por fari novajn filmojn. Cetere, la filmservo urĝe bezonas monon por farigi kopiojn de la filmoj pri Groet kaj Tervuren. Nia celo estas: La filmoj cirkulu en kiom eble plej multaj landoj!

„Ni ne povas pagi tiom da mono!” ĝemas la pesimistoj.

„Ne gravas,” diras la optimistoj, „Ni organizu lotumadon, kaj post kelkaj monatoj nia propagand-filmservo brile funkcios! Ni montros la filmojn en la lernejoj kaj gepatraj kunvenoj! Ni tiom entuziasmigos la infanojn kaj gepatrojn, ke ili devigos la geinstruistojn instrui esperanton! Tiel ni en mallonga tempo konstruos fortegan TJO-konstruaĵon. — Por tiom grava tasko ĉiu konscia esperantisto ja volos labori. De multaj samideanoj ni ricevos premiojn, kaj ju pli da premioj, des pli facile vendiĝos la lotoj. Ni certe povos vendi 3000 lotojn po 25 c!”


Geamikoj, espereble estas inter vi multaj optimistoj, tiam ni komune sukcesos. La celo certe valoras nian penon!

— Tuj kiam ni ricevis la permeson ni presigos la lotojn. Se eble ili aperos en libretoj de 25 ekz.

Jam nun sciigu al la TJO-Centro, kiom da ekz. vi povos vendi! Ankaŭ premiojn oni sendu al la TJO-Centro en West-Graafdyk. Ĉio estos bonvena!

STRECU VIAJN FORTOJN!

NIA DOMO KAJ ĜARDENO.



Nia familio: Patro, Patrino kaj la infanoj loĝas en domo. La domo estas granda kaj alta, ĉar ĝi estas domo kun etaĝo. La domo estas blanka, ĝia tegmento estas ruĝa kaj ĝia pordo estas nigra. Apud la nigra pordo kaj en la muro de la etaĝo estas du fenestroj. La kadroj de la fenestroj estas grizaj.

En la ĝardeno antaŭ la domo staras kaŝtan-arbo. La arbo estas dika. La folioj de la dika arbo estas verdaj. En nia ĝardeno estas ankaŭ kaktoj kaj floroj. La kaktoj estas rondaj aŭ longaj kaj pintaj. La floroj estas belaj. Apud la domo kreskas blankaj floroj kun flavaj koroj; apud la krado de la ĝardeno estas ruĝaj floroj kun nigraj koroj, kaj ankaŭ bluaj floroj. La blankaj kaj ruĝaj floroj estas belaj en la haroj de la knabinoj kaj virinoj.

a				
alt-a	blu-a	griz-a	pint-a	verd-a
bel-a	flav-a	long-a	rond-a	
blank-a	grand-a	nigr-a	ruĝ-a	
o				
la etaĝ-o	la har-o	la krado	la tegment-o	
la fenestr-o	la kadr-o	la mur-o	la vir-o	
la foli-o	la kor-o	la pord-o	la virin-o	
antaŭ		ili kresk-as	ĝi star-as	


Ekzerco: Enmetu *o* aŭ *a*: La dom... estas blank... La blank... dom... La arb... estas dik... La dik... arb... La tegment... estas ruĝ... La ruĝ... tegment... La pord... estas nigr... La nigr... pord... La knabin... estas bel... La bel... knabin... La ĝarden... estas grand... La grand... ĝarden...

Ekzerco: Traduku: Mia patro kaj via patro iras al la urbo. Lia patrino kaj ŝia fratino estas en la ĝardeno. La leono estas besto; ĝia buŝo estas granda. Nia insulo estas bela. Ili filino laboras en la domo. Miaj fratoj naĝas en la mar-o. Viaj fratinoj laboras en la ĝardeno. Liaj floroj estas blankaj kaj ŝiaj floroj estas ruĝaj. La arbo estas alta; ĝiaj folioj estas verdaj. Niaj domoj estas blankaj. Iliaj fratoj ludas sur la stratoj.

Gramatika enhavo: la adjektivo (epiteta kaj predikata) a — aj;
La kopulo; est-as; ĉiuj posedaj pronomoj; la prepozicio: antaŭ.

Leciono 8.

NIA LEGOM-GARDENO.



Malantaŭ nia domo estas kampo kun legomoj; ĝi estas nia legom-ĝardeno. Patro kaj nia najbaro promenas en ĝi. Sinjoro Delmonto demandas al Patro: „Ĉu vi estas kontenta, najbaro? Ĉu la legomoj estas bonaj kaj freŝaj?”

Patro respondas: „Pri la laktuko, la karotoj, la bulboj kaj la terpomoj mi estas kontenta. Sed pri la tomatoj mi estas malkontenta: ili restas malbelaj. Kaj ankaŭ la verdaj faboj ne kreskas: ili restas malgrandaj kaj estas malbonaj.”

Malantaŭ la dolĉaj terpomoj staras kelkaj frukt-arboj: sep fig-arboj kaj ok daktil-palmoj. Sub fig-arbo estas verda benko. Mimi, nia rapida, nigra kato, sidas sur ĝi. En la tero, sub la benko, estas truo de kamp-musoj. La kato atendas. Sed la musoj ne venas, ĉar super ili atendas la „nigra danĝero”.

alt-a mal-alt-a; dik-a mal-dik-a; long-a mal-long-a
bel-a mal-bel-a; grand-a mal-grand-a; rapid-a mal-rapid-a
bon-a mal-bon-a; kontent-a mal-kontent-a; antaŭ mal-antaŭ

ĝi atend-as	fab-o	mus-o	sep
benk-o	fig-o	ok	super
bulb-o	freŝa	ili promen-as	la tag-o
li demand-as	kamp-o	li respond-as	la ter-o
daktil-o	karot-o	ili rest-as	terpom-o
la danĝer-o	kelk-aj	la laktuk-o	tru-o
dolĉ-a	la mez-o	sed	

Ekzerco. Traduku kaj reesperantigu: al ili; al mi; en ĝi; kun ni; kun ili; sub ĝi; sub ili; sur ĝi; sur ni; super li; super ŝi.

Ekzerco: Traduku:

la banan-o	la ĝarden-o	la banan-ĝardeno;	la kamp-muso
la daktil-o	la palm-o	la daktil-palmo;	la kaŝtan-arbo
la dom-o	la best-o	la dom-besto;	la legom-ĝardeno
la dom-o	la pord-o	la dom-pordo;	la tag-mezo
la fig-o	la arb-o	la fig-arbo;	la terpom-planto
la frukt-o	la arb-o	la frukt-arbo;	la tomat-planto
la ĝarden-o	la benk-o	la ĝarden-benka;	

Gramatika enhavo: la personaj pronomoj post prepozicio; kunmetitaj vortoj, konsistantaj el du substantivoj; la sufikso: mal; la kopulo: rest-as; la prepozicio: super; ripetado: a — aj.

Korekto: En la sesa leciono (paĝon 49) la vorto *pulso* estas erare uzata; devas esti *manradiko*. Sur paĝo 50 (5) staras: leganto, tio d.e. lernanto.

LUDOJ.

Tio pensigas min pri: La ludantoj sidas en rondo ĉirkaŭ la tablo. Unu ekdiras: „Mi pensas pri kaldrono.” La dua diras: „Kaldrono pensigas min pri vapore”. Tria: „Vapore pensigas min pri ŝipo”. Kvara: „Ŝipo pensigas min pri vojaĝo.” Ktp. Post unu aŭ du rondiroj oni ripetas la serion en inversa sinsekvo, do oni komencas per la lasta vorto kaj finas per „kaldrono”. Ŝiu, kiu eraras aŭ haltas ne plu kunludas.

La fruktarbejo: La ludantoj formas grandan rondon. Unu foriras. Meze en la rondon oni metas ŝuon, aŭ alian objekton: ĝi prezentas pomarbon — la rondo prezentas muron. La ludanto, kiu foriris, estas la bubo, kiu ŝtelas la pomojn. Unu en la rondo estas farmisto, kaj li penas kapti la hubon, kiam li foriras kun la pomoj. La bubo eniras la rondon tra spaco inter du infanoj, kaj devas eliri tra la sama malfermaĵo. Se la farmisto sukcesas tuŝi la bubon, li fariĝas bubo, alie la sama bubo denove estu ŝtelisto.

Enigmo: Kiu portis en Nederlando la plej grandan ĉapelon en la 17-a jarcento? (Vidu la solvon aliloke en la gazeto).

Por komencantoj.

Ŝi bezonis du sakojn!

Venas ŝarĝaŭtomobilo kun karbo. Ĝi haltas ĉe alta domo, kaj la karbovendisto diras al ŝia helpanto: „En la kvina etaĝo loĝas sinjorino. Portu al ŝi sakon da karbo.”

La helpanto kapjesas. Li metas la sakon sur la dorson kaj iras al la kvina etaĝo. Post kelkaj minutoj li revenas kun la plena sako ankoraŭ sur la dorso.

„Kion signifas tio?” demandas la karbo-vendisto. „Kial vi reportas la sakon? Ĉu ŝi ne estas hejme?”

„Jes,” respondas la helpanto. „Sed ŝi diris, ke ŝi bezonas du sakojn da karbo!”

EL „DANSK ESPERANTO-BLAD”.

Tempo estas mono.

Komercisto intencis fari longan vojaĝon. Li adiaŭis siajn amikojn kaj diris: „Mia tempo estas tre valora. Pro tio nur skribu, kiam absolute necesos. Mi tute ne ŝatas ricevi leterojn. Kutime ili servas al nenio. Kaj mi ankaŭ ne ŝatas skribi!”

Pasis unu monato, du, tri monatoj. La komercisto ne revenis, kaj ankaŭ ne skribis. Liaj amikoj estis maltrankvilaj, sed ili ne kuraĝis skribi. Subite unu el ili havis bonan ideon. Sur paperfolion li skribis nur grandan demandan signon. Tio signifis: „Ĉu io nova?”

Post kelkaj tagoj venis la respondo. Oni malfermis la koverton, kaj trovis nur blankan paperfolion. Oni komprenis, ke tio signifas: „Nenio.”

Nepersona opinio.

Johano: Kaj krome li nomis min „stultulo”!

Jozefo: Ne atentu tion. Vi ja scias, ke Alberto ne havas personan opinion. Li nur ripetas kion li aŭdas de aliaj!

EL „FLANDRA ESPERANTISTO”.

Tro malgranda!

La edzo: Kial vi aĉetis por mi tro grandan ĉemizon?

La edzino: Mi ne volas sciigi, ke mia edzo estas tro malgranda.

EL „KOMPRENI”.

Legu la rakontojn kelkfoje kaj rakontu la enhavon per propraj vortoj.

INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO!

Mi legas pri la junularkunveno, kiu okazos en la venonta somero. La unua internacia kunveno post la terura milito, kaj mi pensas!

Denove ŝvebas antaŭ miaj okuloj la belaj tagoj en aŭgusto de la jaro 1939a. Tiam mi estis en la belga urbeto Tervuren, apud la ĉefurbo Bruselo. Mi partoprenis en la dua Internacia Junularkunveno. Per aŭtobusoj ni iris al Belgujo, kaj ni ĉiuj estis tre gajaj. La kunveno komenciĝis per manĝado, kaj mi vidis ke ĉiuj, angloj, francoj, belgoj, kimroj, nederlandanoj, skotoj, frizoj, danoj, ktp. manĝis same kiel mi, tio estas kun granda apetito. Ridoj sonis tra la salono, strange, la ridado estas ankaŭ internacia!

Ni kantis la belajn esperanto-kantojn de bonhumoro kaj vivoĝojo, kantojn de libereco kaj bonespero. Ho, bele la tagoj forpasis. Ni ankaŭ multe promenis en la arbaroj kaj inter la montetoj. Per aŭtobusoj ni vidis grandan parton de la belga lando.

Kiam mi ree veturis hejmen mi estis malgaja, ĉar la gazetoj multe skribis pri milito. Mi neniam povos mortigi tiujn, kiuj estis en la kunveno, mi pensis. Estas ja infanoj tiaj, kia mi, ho ne, neniam mi mortpafos!

La milito preterpasis kaj ni denove vidos unu la alian en la Internacia Junular-Kunveno de la Tutmonda Junular-Organizo. Ĉu vi ankaŭ venos? Ni estos geamikoj! Viĉjo.

Ekzercoj:

LA KUKOLO.

Plenigu la mankantajn vortojn: Kukolo parolis . . . sturno, kiu venis . . . la urbo. „Ĉi demandis . . . la sturno: „Kion oni diras . . . niaj melodioj? Kion oni diras pri . . . najtingalo?”

„La tuta urbo laŭdegas kantojn,” respondis . . . sturno. „Kaj . . . la alaŭdo?” — „La duona urbo admiras tiun kantiston.” — „Kaj . . . la merlo?” — Ankaŭ pri . . . oni aŭdas laŭdajn voĉojn.” — „Kaj kiel . . . taksas min?” fine demandis . . . kukolo scivole.

„Ĉi tion mi tute . . . scias,” redonis . . . sturno indifere, „ĉar neniu parolis . . . vi.”

Jen la kukolo . . . koleris, forflugis, kaj . . . tiu tempo ĝi mem vokas sian propran nomon ĉiam . . . ĉie, por ke oni aŭdu . . . ĝi.

La sekalo-spikoj.

Korektu la erarojn: Filagano kaj sia vilo iris al la kampoj por fidi, ĉu la sekalo jam maturigas. Ili venis al kampo, kaj rimarkis, ke kalkaj trunketoj kreskas rekta supren. Sed la plej multaj klinis la kapetojn teren.

„Estas domage,” diris la vilo, „ke nur malmultaj herbetoj staras rekte. Jen vidu, patro, kiel fire ili tenas la kapojn cielen. Oni devas bedouri, ke tiom multaj malzanas, kaj malzerene rikardas teren.”

„Fi eraras,” respondis la patro. „La spikoj, kiu tiom multe fieras estas malplenaj kaj ne utilas al ni. Sed la aliaj, la modestaj, kiu klinas teren, estas plenaj de greneroj kaj de ili ni riĉevas la ponan panon. Estas kiel ce la homoj. La pli modestaj kutime estas la plej utilaj, la plej vieraj homoj ne taugas.”

Jen la korektita ekzerco el la antaŭa numero:

Pacienco.

Du veturigistoj renkontas unu la alian ĉe mallarĝa ponteto. Neniu el ili deziras flankeniri, do ambaŭ haltas. Unu el ili kviete prenas ĵurnalon el la poŝo kaj komencas legi. Tio tamen tute ne senpaciencigas la alian. Goje li krias: „Tuj kiam vi estos preta, bonvolu transdoni ĝin al mi!”

La kantaron gajnis s.ro Toorneman en Deventer (Ned.)

ĜENERALAJ SCIĜOJ.

En la Regnan Universitaton en Sofio (Bulgarujo) oni enkondukis Esperanton kiel instrufakon.

En la Komerc-Teknika Lernejo en Forli (Italujo) Esperanto estas instruata kiel dua deviga lingvo.

La konata verkisto Julio Baghy momente estas sekretario de unuigo de esperantistoj-policiŝtoj en Budapeŝt (Hungarujo).

En Hungarujo kaj Francujo oni konsideras Esperanto-elsendojn. La landaj Esperanto-Unuigoj tial petas ŝendi aprobeletojn al Magyar Kőzponti Hirado R.T., Budapeŝt VIII, Sandur ut. 7; kaj al Radio Nationale, Courrier des Auditeurs, 107 Rue de Grenelle, Paris.

„Sveda radio” dissendos programon en Esperanto marde la 16an de aprilo je 15.10—15.30 laŭ grenviĉa tempo (t.e. 16.10—16.30 laŭ mezeŭropa tempo) per la mallonga ondo 19.80 m. La sama programo estos ripetata por ekster-eŭropaj landoj merkrede la 17an de aprilo je 1.10—1.30 laŭ grenviĉa tempo per mallongaj ondoj 31.46 m kaj 49.46 m.

En la venontaj monatoj la Esperanto-dissendoj okazos je la samaj horoj la 16an (17an) de majo, la 14an (15an) de junio kaj la 16an (17an) de julio.

Bonvolu ŝendi informojn pri la aŭskulteblecoj kaj eventualaj programpropozoj al Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm, al kiu estas komisiita de la sveda Radio aranĝi la Esperanto-programojn.

Pri la familio Zamenhof.

La lasta sciigo, kiun ni ricevis, estas ke fino Lidja Zamenhof troviĝas en Sovetio. Pri la ceteraj anoj neniam novaĵoj.

KORESPONDADRESOJ

Anglujo: Gelernantoj 8-11 j. dez. interŝ. il. poŝtk. kun la tuta mondo. Afranku bildflanke. Resp. certa. Skribu al S.ro Teare, Halewood School, Liverpool.

Belgujo: 30 gejunuloj 15-20-jaraj dez. kor. per il. poŝtk. kun samaĝaj samideanoj en ĉiuj landoj. La Korespondcentro, 3, Grand' Place, Braine-le-Chateau, transdonos la unuajn sendaĵojn.

Bulgarujo: S.ro Ivan B. Krestanov, L.K., publicisto kaj gimnazia profesoro en Pirdop (Sofia) salutas siajn geamikojn en la tuta mondo.

F.ino Tomuška Jr. Kiskova, 17-jara liceanino en Posteru, deziras korespondi.

Kojĉo H. Koev, studento, str. „20 April” N. 11 (familio Baŝkandĝijski), Sofia, dez. kor. kun Esperantistoj en Nederlando.

Francujo: 18-jara f.ino Silvianna Josseaux, 11, Allé de la Prévijance, Foyer Remois, Reims, dez. kor.

F.ino G. Pichon, 13 rue du Commerce, Gex (Ain), juna studentino, dez. kor. pri muziko, literaturo, lingvoj (angla, germana, latina, itala), kaj juro.

Islando: Jakob v. Jónasson, 25-jara medicinstudento, Gamligardur, Reykjavik, dez. kor. kun Nederlandanino. Post 1 junio la adreso estos: Gránufélagsgata 19, Akureyrt.

Nederlando: Por miaj lernantinoj (komencantoj, 11-15-jaraj) mi serĉas samaĝajn gekorespondantojn en ĉiuj landoj. Skribu unue al: F.ino C. v. d. Oord, Schermerhorn (NH).

S.ro P. Korte, lernejestro, Schoolstr. 13, Veendam, serĉas kor. kun ĉiuj landoj por 30 knaboj kaj knabinoj 13-15-jaraj, komencantoj. Unue kor. per bildkartoj, poste per leteroj. Certe respondos.

Kelkaj anoj de la TJO-grupo Gouda dez. kor. kun gejunuloj en ĉiuj landoj. Skribu al S.ro Dykstra, L. Dwarsstr. 34, Gouda.

Svisujo: S.ro Petitpierre, 14 rue Chauvet, Geneve, petis nin sciigi, ke li ricevis pli ol 300 leterojn, do bedaŭrinde ne povos respondi je ĉiuj.

Svedujo: „Cykelbilisten”, faka gazeto, senpage enpresigas korespondadresojn. Adr. Säby, Svedujo. Interesatoj petu specimenon.

Islama Koresponda Rondo celas disvastigi ĝustan komprenon pri Islamo ĉe esperantistoj. Petu informojn de IKRO, 10, St. Philips Place, London W.C., Anglujo.

ANONCETOJ.

Aliĝu al Universala Filatelia Esperanto-Klubo (U.F.E.K). Ne hezitu, skribu tuj al la centra oficejo: 5 rue S. de Brazza, Casablanca, Maroko. Petu „Informantan Varbfolion”.

Abonu „Leterkolombo”, la int. kor. gazeto por ĉiuj. Esp. red. Interesa, amuza enhavo. Aperas monate. Jarabono 1.50 usona dolaro aŭ 20 int. resp. kuponoj. Red. adr: Leterkolombo, Seinäjoki, Tammilehto, Suomi-Finnlando.

Solvo de la enigmo: Kiu havis la plej grandan kapon!